

Mi, minoritatoj kaj minoritataj lingvoj

Kio vi estas?

Se kelkajn jarojn antaŭe vi tion demandis al mi, eble mi ne sciis kiel bone respondi tiun demandon. Feliĉe hodiaŭ mi iom pli bone scias kiel respondi tiun demandon.

Pri mia familio

Mia familio ambaŭflanke eldevenas el la gubernioj Hokkajdo kaj Akita. Miaj praavoj, kiel multaj japanoj, migris al Brazilo kun siaj familioj pro la promeso riĉiĝi kaj iutagon reveni al Japanio. Kvankam, kiam ili alvenis tien, ili rimarkis, ke ili estis trompitaj. Do, venis la milito kaj ĝi ege ŝanĝis iliajn vivojn. Pasis la tempo kaj ili ne plu pensis reveni al Japanio.

Pro la diskriminacio spertita dum la milito kaj la longa diktaturo kiu ĝin sekvis, multaj japanoj finfine ne transdonis sian lingvon al la infanoj. Rezulte, multaj en mia generacio tute ne scipovas paroli la japanan.

Mia infaneco

De kiam mi estis infano, mi ĉiam sciis, ke miaj geavoj venis el Japanio kaj eĉ povis trovi Japanion kaj Brazilon en la ter globo, sed eble tiam mi ne sciis kion tio signifis.

Dum miaj gepatroj laboris, miaj geavoj prizorgis min kaj mian fraton. Tiam, mi kantis infankantojn kiel "Kutsu ga Naru" aŭ "Furusato", sen tute scii la signifon de la tekstoj. Mia plej ŝatata fabelo estis "Hanasaka Jiisan", eĉ se tiam mi tute ne komprenis la kulturajn aspektojn ene de ĝi.

Reago

Kvar-jaraĝa mi eniris infanĝardenon kaj eksciis, ke mi estis malsama. Laŭ la aliaj infanoj, mi estis japano, kvankam mi diris, ke mi naskiĝis en Brazilo. Mia unua reago estis malami min, ĉar mi estis malsama. Mi malakceptis mian heredaĵon kaj ĉion japanan. Mi ankaŭ rifuzis kanti tiujn kantojn, kiujn mi lernis el miaj geavoj. Kiam mi eniris la elementan lernejon, mi ekrimarkis, ke mi ne sciis la nomon de preskaŭ neniu legumo portugale. Mi do decidis forigi preskaŭ ĉiujn vortojn japanajn el mia vortprovizo.

Kun la tempo, mi eksentis, ke mi devis iĝi pli brazila. Provi konformiĝi kun la plimulta loka kulturo fojfoje signifis kontraŭi ankaŭ la edukadon, kiun mi ricevis el mia familio. Kaj kompreneble mi malsukcesis tiel profunde ŝanĝiĝi. Mi eĉ memoras fari stultaĵojn kiel, ekz., ŝajnigi ne scii kiel manĝi kun bastonetoj en japana restoracio.

Ŝanĝpunkto

Iutagon, kiam mi estis 8-jaraĝa, vizitis nin kelkaj parencoj el Hokkajdo. Danke al ili, mi unuafoje interesiĝis pri Japanio. Post ilia reveno, ni ekinterŝangis leterojn, novjarajn salutkartojn kaj fojfoje prezentojn dum 18 jaroj. Dum tiuj jaroj, mi iom post iom ekakceptis mian heredaĵon. Mi eble sentis, ke havi malbonajn sentojn pri ĝi signifis ankaŭ malami mian familion. Kvankam, tio estis longa kaj malrapida proceso.

Kiam mi estis 11-jaraĝa, mi ekaŭskultis japanan popularan muzikon kaj tio, kune kun mia tutviva intereso pri animeo, ankaŭ kontribuis helpi tiun proceson. Sed pro ke mi sentis, ke la japana muziko estis tro "azia", mi ĉiam kaŝis tion el miaj geamikoj. Tiam, mi toleris mian aziecon, sed ĝi iĝis iasence sekreta parto de mia vivo. Malsame al mia frato, mi neniam havis multe da japanaj amikoj. Mi neniam sentis emon amikiĝi nur kun homoj similaj al mi. Mia frato, aliflanke, eĉ hodiaŭ preskaŭ nur sociemas kun japanoj.

La malkovro de minoritatoj

Ankaŭ kiam mi estis 11-jaraĝa, mi ekamikiĝis interrete kun katalunoj, galegoj kaj eŭskoj. Estis grandega malkovro por mi scii, ke Hispanio estis plurlingva lando. Pere de tiuj amikoj, mi ekinteresiĝis pri minoritatoj kaj minoritataj lingvoj. Inter miaj geamikoj, estis ankaŭ kelkaj kiuj rifuzis siajn lingvojn kaj identecojn. Mi tiam tute ne povis kompreni kial ili faris tion, sed tiu respondo fakte troviĝis ankaŭ ene de mi.

La dua ŝanĝpunkto

Kiam mi estis 15 jaraĝa, mi ekstudis la japanan. Mi ankoraŭ memoras kiam mi unuafoje skribis japane al miaj parencoj. Tiam, eble, mi ne plu sentis emon kaŝi mian identecon. Bedaŭrinde, ju pli kreskis mia intereso pri la norma japana kaj la moderna japana populara kulturo, des pli kreskis mia malestimo al la nordorienta dialekto. Tiam, mi ne sciis pri la dialektoj de la japana kaj pensis ke miaj geavoj parolis tiun strangan japanan ĉar ili havis malmultajn okazaĵojn studi. Mi ankaŭ ofte sentis min senidenteca homo, ĉar mi nek sentis tutan apartenon al Brazilo, sed samtempe konsciis, ke mi ne estis japana.

La kroma kontakto kun minoritatoj

Kiam mi estis 16-jaraĝa, mi decidis lerni la katalunan pro ke mi jam delonge havis bonajn katalunajn amikojn kaj ŝatis la lingvon. Tiam, la kataluna iĝis mia plej ŝatata lingvo. Kun la tempo, mi lernis ami la lingvon, la kulturon, kaj eĉ senti min iom kataluna. Mi sentis, ke ĝi plenumis la malplenecon, kiun mi sentis pri mia manko de identeco. Mi havis fazon tro fanatikan pri la kataluna kaj Katalunio. Mi provis purigi mian katalunan de ĉiu hispana influo. Mi iĝis sendependentisto eĉ se mi, tiam, neniam iris al Katalunio. Mi konatiĝis kun multaj fieraj katalunoj, sed ankaŭ kun multaj tute ne fervoraj katalunoj.

Kun la tempo, mia intereso pri minoritatoj kreskis. Mi lernis aliajn minoritatajn lingvojn kaj ankaŭ konatiĝis kun minoritatuloj el diversaj landoj. Pro tiu konstanta kontakto kun minoritatoj, kiam mi estis en universitato, mi finfine ekrekonis min mem ankaŭ kiel minoritato. Mi do ekkomprenis, ke multe el tiuj sentoj de minoritatuloj, kiuj ŝajnis al mi tute ne kompreneblaj, mi ankaŭ havis: rifuzo, malamo, malfiero, manko de memfido.

Kial ni devas protekti minoritatajn lingvojn kaj kulturojn?

Laŭ kelkaj sciantaj artikoloj, estas klara rilato inter la kvanto de memmortigoj kaj manko de konoj pri la denaska lingvo en minoritataj komunumoj en Kanado. Kelkaj artikoloj ankaŭ asertas, ke la revivo de la denaska lingvo kunportas ankaŭ plibonigon de bonfarto, de mensa sano, de sciiĝa kapablo kaj de edukada sukceso. Parolantoj ankaŭ disvolvas pli da estimo kaj senso de kunligo, de fiero kaj de identeco pri sia kultura heredaĵo.

En Japanio, minoritatoj ankaŭ ekzistas, ĉefe en Okinavo kaj ĉi tie en Hokkajdo. Mia unua mesaĝo hodiaŭ estas: protektu viajn lokajn minoritatojn.

Etikedoj

Ni homoj amegas klasifiki aferojn pere de etikedoj. Ni bezonas ĉion nomi. Se io ne tute konformas iun etikedon, ni simple kreas novan etikedon por klasifiki ĝin.

Mia sperto estas, ke etikedoj ja helpas vin trovi vin en la mondo. Fojfoje, mi sentis min malsaman al la aliaj, kaj kiam mi trovis etikedon por klarigi ion pri mi, mi sentis min pli komforta.

Aliflanke, etikedoj ofte enhavas stereotipojn kaj iasence devigas vin konformi kun io. Ekz., mi provis konformiĝi kun la etikedo de "brazilano", sed mi sentas min nek tute brazila nek tute japana. Tiusence, etikedoj ja limitigas vin.

Nenio en la mondo estas blanka aŭ nigra: ni kutime troviĝas ie en spektro.

Do, kio mi estas?

Do, se vi demandas min "kiu vi estas"? Mia respondo estus: "Mi estas Yuji. Mi estas 28-jaraĝa brazila japano, sendiulo, programisto, kareomaniulo, lingvomaniulo, esperantisto, samseksemulo, introvertita, timida, forgesema, prokrastema, senorientopova, hezitanto, ktp., sed nenio el ĉi tiuj vortoj difinas min. Do, mia lasta mesaĝo estas: ne lasu ke la aliaj decidu kiun vi devas esti.

"Kiam vi etikedas min, vi neas min." (Søren Kierkegaard)